LEGADO DE FOTOGRAFAĴOJ

DONACOJ KAJ REDONACOJ

La unuan sian ekspozicion **100 fotografaĵoj de Steva Kragujeviĉ, dudek jaroj de laboro 1936 – 1956** mia patro arangîs en Senta, kaj printempe de 2000 – ĉeestis la lastan.

Por mi estas grava indiko kiu estas trovebla en titolo de la unua ekspozicio, laŭ kiu estas videble, ke Steva ligis siajn profesiajn komencojn al la jaro 1936. – kiam li estis dekkvarjara knabo.

En urbeto dum tridekaj jaroj kiam Ŝtica lernis metion ĉe sinjoro Martin Rónai, fotografio ne estis raraĵo. Sed, tamen estis ekskluzivo – fenomeno kiu animis konsekritojn, samtempe altiris ĝeneralan atenton, kaj restis grava dokumento en personaj albumoj kaj arkivoj de la urbo. Mi povas nur imagi hodiaŭ, dum trarigardo de riĉa foto heredaĵo de mia patro, kia granda ekscito transformis sian knaban statuson el malriĉa metilernanto, Steva kun pura amo transformis en konserito. La tuta plurdekjara arko, pli ol sesdek jaroj, estas plenskribita per liaj fotografaĵoj, kaj same tiel longe kaj abunde li estas ligita al propra naskiĝurbo.

Kiam ni trarigardas aro da fotografaĵoj faritaj en Senta, aŭ fotoraportaĵoj dediĉitaj al urbo, ni povus konsideri ke ilia aŭtoro pasigis la tutan sian vivon ĉi tie – ke li neniam forlasis ĉi tiun urbon. Sed, sendepende de tio ke fine de kvardekaj jaroj lia kariero gvidis lin al ĉefurbo, en lia fokuso kaj en lia koro, Senta estis kaj restis sanktigita loko. Ĉi tie li estis hejme, al ĉiu konata Ŝtica – kaj jen, eĉ hodiaŭ ni povas diri – estis, kaj restis, Stevan Kragujeviĉ Sentano.

Iam mi kunpremis mian biografion en unu verso – **naskita en nigrablanka fotoeksponado.** *Ĉar eĉ mia unua vivotago, estis markita per kamerao, en hospitalo en Se nta, en brakoj de mia rideta patrino.*

Kaj hodiaŭ, kiam mi rigardas eĉ pli malfruan foton, kiu estiĝis verŝajne dank` al Ilonka, juna lernantino en salono Jakŝiĉ, kun kiu miaj gepatroj kune pasigis la tagojn de lernado en malabundaj cirkostancoj de kvardekaj jaroj, mi sur tiuj gajaj junaj vizaĝoj kaj magraj cirkostancoj en korto de Jakŝiĉ, en tiu kontrakta laboro por esti mastro – purigado, preparado de ligno por hejtado, forigado de ĝermigitaj herboj – en tiu ligna ĉareto, en kiu mia patro, kvazaŭ en infana ludo promenveturis sian gracilan elektitinon – mi ne vidas penadon, sed ĉarmecon – nur amon. Sed mi estas ĉi tie ankaŭ, konkludis mi, en iliaj enradiaj mienoj. En la nubo de tiu brilo de admiro.

Kiam mi trarigardadas tiujn ĝis hodiaŭ gardatajn eksponadojn de nekonataj Sentanoj, kiujn juna metiisto Stevo devis fari laŭ postulo de sia mastro Danilo Jakŝiĉ, starante ĉe angulo de iu strato aŭ ĉe urba placo, por ke tiujn fotografaĵojn morgaŭ sinjoro Jakŝiĉ metu en fotografista montrofenestro kaj

tiel altiri aĉetontojn, mi ne vidas malvolontan respondon en tiu neagrabla tasko, de tiu juna homo, kiu pli volonte estus en iu alia loko kaj laborus ion alian – sed tutan galerion de vizaĝoj, el kiuj ĉiu estas aparte unu mozaiko en rakonto pri nia urbo. Pri nia civito.

Mi vidas amason da esceptaj portretoj malantaŭ kiuj, kiel fotografaĵo povas tion diri, staras tuta fabelo. Junulo en ŝirita trikotaĵo, preskaŭ ankoraŭ spiregi, trakuris la centron en sia suferego; homo kun kamparana ĉapelo en por li ĝena urbana vestaĵo; virino bendita per nigra tuko, ĉirkaŭprenita kun sia por ni nekonata, dura mizero; knabinoj gajaj kun siaj stakoj da glaciaĵoj ...

Diri ke fotografaĵo estas duobla provo kun nekonato estas malmulto.

Kiam mi vidas Sentanan korson, sur kiu sinjoro Vaŝ biciklas, mi vidas en malantaŭo ankaŭ lian kafejon. Kion mi povus scii hodiaŭ komence de la tria jarmilo pri kafejo de sinjoro Vaŝ, pri aspekto de korso fine de kvardekaj jaroj de pasinta jarcento, se ne estus tiu foto. La biciklo, jen, de glata parto de vojo ĉe malgranda parko, jam atingis ŝtonan vojon. Sur venonta kvadrato de la filmo frontloke estas videblaj nur du-tri apartigitaj ŝtonoj. Kaj nenio alia. Tri samaj, unu alia, iomete defrapita, eble de ĉevala hufo.

Kion deziris diri tiu silentema, eksterordinara eksponado?

Elsorĉas ĉiumaniere, kun sia tuta enigmo, ankaŭ senco de fotografio por muta parolado, jen eĉ Sentana ŝtono, kiu estiĝos promenejo, loko por kolektiĝo de prestiĝa loĝantaro, sed ankaŭ de gastoj, sportistoj, artistoj, aŭ vojaĝantoj, tuŝgastoj, por kiuj elvoko aŭ devo ordonis veni en nia urbo, al urba merkato, al kuracisto, aŭ enskribi infanojn en lernejoj.

Tiel nuanco en viditaĵo, atento por ekzisto de unu ŝtono, kiu estas diversa en amaso da identoj, malfermas apartan miniaturan ĉapitron en historio de Sentanaj stratoj.

Sed, al mi persone parolas multe. Estas kvazaŭ ankaŭ parto de mia biografio. Ĉar pro tiu sekundeto de alispeco, tiu turniĝo en percepto, mi kredas ke mi estas vera filino de mia patro – ke en turniĝo en vicordo de bildoj, sen tia percepto, mi ne estus poeto.

En amaso de dilemoj kiuj min kaptas ĉe ĉiu eksponado, en miaj pripensoj ĉu mi ilin transdonu por konservo, min gvidas ĝuste tiu duobla fabulo de fotografaĵoj.

Eĉ kiam mi ne rekonas la facojn, ĉiam sur fotografioj de Stevo estas ebleco rekonstrui pli profundan anoncon, iun fragmenton el historio de nia urbo. La virino, kiu plenigis spacon de sia fenestro, estas vera kadro por Vojvodina pentrista tolo.

Kiam mi observas grupon de gejunuloj en urbocentro, mi vidas lukse belan junularon, sed ĉi tie estas jam fotoalbumo de la historio de nia urbo – Foto-Etika, sub la urbodomo, reklamoj por kinoprezentadoj eĉ tiam, komence de

kvardekaj, urba parko, kaj en malantaŭo presejo "Udarnik". Knabinoj kaj poploj, knabinaj-poploj, kaj same svelta, eĉ pli alta enigma kolono. Steva por klarigo skribis: "pumpilo por irigacio". Ĉe ĵus falĉita tritika kampo li prezentis pajlopremilojn. Kaj poste, ĉi tie estas pompo de maiza rikolto, ligitaj en sakoj kun dormantaj kolektantoj apude, dum ili atendas trajnon kaj ŝarĝadon.

En iu mia pli nova malkovro, jen ankaŭ benzin stacio – ŝajnas iel monda, en la centro de malgranda urbo, sed nur du enuiĝintaj benzinaj laboristoj, kiuj ŝakludas en la ombro kaj montras al ni, kiom estas sporada aŭtomobila trafiko en provinco, kie estas trota- kaj durada ĉaro, ŝarĝveturilo kaj neeviteblaj bicikloj. Jen ankaŭ bele vestitaj Sentanoj, kiuj venis kvazaŭ en la dimanĉa promenado kiel honorvizito al sia propra urbo. Inter ili ankaŭ Franco Bindl, posedanto de "Foto-Etika".

Detruitan Sentanan ponton en 1941. mia patro eksponis kiel deknaŭjara junulo. Ĉe ponto estas figuro de nekonata viro, eksponita de dorsa flanko, sed li estis dorskurbita de ŝarĝo de tiu sceno.

Kun sama ŝarĝo en animo estis farita tiu eksponado.

Tiu terenbatita homo estis sendube persone Steva, interne.

Eble pro tiu eksponado li ŝatis eksponadi ĉiun signon de kresko, de florado.

Unu sukeraĵo, en kvardekaj, kun du-tri forgesitaj, netuŝitaj kukoj, kaj du vendistinoj en malantaŭo, kaj sur la muro, afiŝo en hungara lingvo – kun mesaĝo – "elimini analfabetizmon". Tiu jam per foto konata de Stevo gazetdisportisto konfuza pro atento de fotografisto kaj fokusita objekto, enkonduko en sennombraj eksponadoj kiuj signifas novaĵojn, okazintaĵojn, naskiĝon de urbo, ricevis kun du vendistinoj de kukoj siajn same valorajn kaj gravajn amikinojn.

Naskiĝo de urbo en liaj okuloj, animo kaj kamerao estis ĉiutaga, senhezita. Li ĝin vidis en ĉio – en florantaj siringoj, en cikonio, kiu revenis sur formortita trunko, en kolombistoj ĉe kortbirda merkato, en asfalta tegado de stratoj, en kuŝigo de la unuaj urbaj drentuboj, sed ĉiam kaj aparte, en renovigo kaj kolorigo de ponto, de tiu la plej multe fotografita arko, se mi povas diri ŝerce, kiun Stevan eternigis en ĉiu fazo en ĉiuj koloroj.

Ĉio estis por li, kaptita per okulo de kamerao en Senta, signifo de antaŭeniro, kreo, "elradikigo de analfabetizmo" – ĉar vere signifis savon de forgeso.

Ĉi tie estas sur liaj fotoj ankaŭ svingo de ĵetisto de lanco, ŝakturniro, naĝistoj, tablotenisistoj, unu eta legantino antaŭ malfermita libro. Malfermo de Muzeo, ekspozicioj – en longa tempa daŭro, kiu malfermas la urbon kiel grandan legolibron de unu historio, vidata objektive, per kamerao, sed ankaŭ varme, sunbanite, de si mem ene.

Mi nenion scius pri karikaturisto kaj artisto Rudolf Vitman, kiu subskribiĝis per Gatto Nero, se mia patro ne lasis filmon pri lia unua ekspozicio, kaj per kreitaĵoj kiujn li ankaŭ pli poste, en propraj fotoreprodukcioj, metis por enrigardo al Sentanoj, sur kiuj por ĉiam restis notitaj spritaj desegnaĵoj pri elstaraj civitanoj el antaŭaj epokoj.

Fotoj kaj leteroj kiujn interŝanĝis konata fotografisto el Senta Ferenc Hajoŝeviĉ kaj mia patro, foti unu la alian, kaj korespondi eĉ kiam la spaco kaj la tempo apartigis ilin – estas unu el tiom karakterizaj ĉapitroj en romano pri amikeco kaj naskiĝloko, pri amo kiun gardis dum la tuta vivo. Akvarelisto amatoro Nestor Slavniĉ, skulptisto, Iŝtvan Tot, partoprenantoj de Sentana Artista Kolonio, kreitaĵoj de Milan Konjoviĉ, sinjoro Geza Tripolski kun grupo de vizitantoj dum li prezentas la unuan ekspozicion de Muzeo ... Konstruaĵo de la unua Serba legatejo, kiu jam pereis. Eminenta Gimnazio, juna familio de profesoro Seli, estonta Akademiano. Knabo kun floroj en la brakoj, denove senmortigita estonteco sur fotografioj: sinjoro Svetozar Vukoviĉ, estonta episkopo de Ŝumadio, koresponda membro de Scienca Akademio – sed ankaŭ unu persona fabelo, kuna junuleco en la strato Ĵarko Zrenjanin kaj dumviva amikeco.

Ankaŭ rikolto de vinberoj en familio Jovanoviĉ, en la sama strato de junuleco de Stevo, poste ĉiuj najbaroj de grizaj maljunuloj ĝis beboj en la manoj en fosaĵo de Zmaj Jove, antaŭ la domo de lia Lepa.

Sed kiu ĝis nun ne sidis en fosaĵo svenigita de blanka robinio, tiu neniam veran aeron de Senta nek manĝis nek trinkis. Kiu ne ĉirkaŭbrakis tilion kaj siringon, tiu multe da amon Sentanan ne povis travivi.

Ĉiu el eksponadoj de Stevo havas apartan identecon de Senta.

Preskaŭ ĉiun Stevan gardis en siaj Beogradaj arkivoj.

Mi nur iom-post-iom redonas tien kien ili apartenas.

Laŭ unu anekdoto el junaĝo, Steva rakontis ke mastro Martin Ronai, kiam li malfruis al taga laboro, per tri varmega vangofrapo por ĉiam lernigis esti akurata. Neniam plu estis sen horloĝo, eĉ sen kolektado de horloĝoj.

Li havis krom tio ankaŭ tiun unikan veran, la plej gravan horloĝon en si mem.

La tuta estonta kariero de gazeta fotoreportero, pinta profesiulo tion atestas. Sed ankaŭ senson por tiu momento, kiam aro de blankaj anseroj trapasas vojon de Ĉoka. Kaj kiam fruktarbo floras, kiam naskiĝas malantaŭ de nuboj krepuska Suno en vintra antaŭvespera Vojvodina strateto.

Li estis ĉiam en ĝusta loko, en ora momento – de tempo, de siaj okuloj, kaj propra koro, de propra persona kaj profesia naturo.

Interna horloĝo lin ekmovis kaj gvidis. Nur tiel, mi kredas, povas naskiĝi verkaro, pri kiu ni kutime diras, ke estis kreitaj per animo.

Iam, en junaĝo, kun mastro, sinjoro Danilo Jakŝiĉ, Steva estis en Martonoŝ por fotado de iu edziĝfesto. Kaj restante longe en la nokto en festado, li tradormis la ekvojaĝon hejmen. Sed li jam spertis ke li devas postuli devon, kaj esti akurata, kaj Steva pro tio matene perpleksiĝinta prenis iun biciklon, kaj kondukis ĝin sekvi la trajnon!

Li atingis lokon ĝuste por atendi sinjoron Jakŝiĉ kiam alvenis la trajno en stacidomo, kaj tute ŝvita, sed noble atendis lin per vortoj: " Permesu al mi preni vian pakaĵon!"

Mi ne havas tiom da vortojn kiom da fotografaĵojn havis Steva.

Kaj rakontojn pri ili, pri ni ĉiuj.

Mi rapidas atingi lian trajnon.

Al tiu nubo de vaporo ampleksa, kiel nia tuta ebenaĵo.

Mi ankaŭ, sur liaj kovertoj, filmvolvaĵoj kaj fotografaĵoj, sur longaj rulaĵoj pri liaj vojoj, kiuj komencis en Senta kaj revenis tien, mi dezirus atingi lin en iu haltejo. Mi dezirus diri, kun danko: "Permesu al mi, ke mi prenu vian pakaĵon, mia Patro!"

Stevan scipovis donaci. Kaj faradis tion ĉiam, ĉiutage.

Hodiaŭ estas, ne la unuan fojon, sed por unu grava datumo, kun atento kaj rememoro de Sentanoj al tiuj donacoj io redonita.

Senta, Domo de kreitaĵoj *Aŭtoro*
La 17. de aprilo 2012. *Tanja Kragujevič*

Tradukinto el serba en esperanto: Magdolna Rövid
Korektantoj: Siniŝa Veličkoviĉ kaj Judit Barta

Pročitano na manifestaciji Ago-Tago (Dan činjenja), u Društvu za esperanto, u Senti, 2.oktobra 2012, u znak sećanja na Stevana Kragujevića Šticu.